

La ĵurasa ĉirkaŭaĵo de La Chaux-de-Fonds
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 564, 1974.07.31 & 08.03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan elsendon ni prezentis al vi la urbon La Chaux-de-Fonds, kie troviĝas la interlingvistika dokumentejo CDELI, mallongigo de **Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale**, kaj kie nun stariĝas la sekretario de Kultura Centro Esperantista, mallongigo KCE, kaj de ties Internacia FERIA Altlernejo, mallongigo IFA. Ni tiam diris, ke tiu kvardek mil-loĝantara urbo situas je mil metroj de alteco meze de la montaro Ĵuraso.

A.- Hodiaŭ ni prezentos al vi tiun montaron, provante montri, ke tiu regiono povas prezenti intereson por stud-ekskursoj, kiuj efektiviĝos en la kadro de la kurssesioj de IFA.

Cl.- Ĵuraso estas kalkŝtona montaro. La akvo pro tio ne restas je la surfaco. Ĝi tuj malaperas en rok fendojn. Nur printempe je la neĝdegelo la rojoj havas akvon. Poste ili ĝenerale havas aspekton de ŝtonozaj fluejoj, kiuj ricevas la nomon **Bied**, el la germana **Bett** : lito. En la valoj eĉ tutaj riveroj enfiltriĝas en truojn por reapegi en aliaj valoj. Tiujn valojn, kiuj ne posedas defluejojn, karakterizas malmilda klimato, ĉar dum la senventaj periodoj la malvarma aero stagnas je ilia fundo. Tiel siberiaj temperaturoj de 30 gradoj centigradaj sub nulo estas mezureblaj dum la vintro.

A.- La suproj de la montoj kaj la fundo de la valoj estas ĝenerale senarabaj aŭ kalvaj. El tio la nomo **Chaux** aŭ kalvejo, kiu karakterizas multajn lokojn. **La Chaux-de-Fonds** signifas **la kalvejo de la fonto**. Kontraŭe la flankojn de la montoj, kiuj ĝenerale estas sufiĉe deklivaj, kovras densaj abiaj arbaroj.

Cl.- Tiu paŝteja kaj arbara regiono favoras la migradon. Promenadoj abundas kaj la vojoj estas bone indikitaj. Flavaj montriloj donas la maŝhorojn al la ĉefaj celoj. Survoje montaj kaj vilaĝaj trinkejoj invitas la marŝantojn halti por trinki blankan vinon kaj manĝi bonan fonduon.

A.- La reliefo de tiu montaro estas okulfrappe simpla. La valoj kaj montaroj paralelas de nord-oriento al sud-okcidento. Ili ĝenerale respondas al geologia strukturo. La suproj respondas al antiklinaloj. Sed kluzoj alportas komunikeblecojn inter la valoj. Ni scias, ke Ĵuraso donis sian nomon al epoko de la mezozoika erao. Kaj en la stratigrafio de ĵurasiko lokoj de la kantono Neuchâtel karakterizas la fosiliojn de precizaj periodoj. Tutcerte geologiaj stud-ekskursoj permesos al la partoprenantoj al la kurs-sesioj de IFA intimiĝis kun karakterizaĵoj de la ĵurasa formiĝo.

Cl.- Kiam belas la vetero, kaj tio ĉefe en aŭtuno, ekde la monato septembro el la supro de Ĵuraso oni malkovras eksterordinare vastajn horizontojn. La monto **Mont-Racine**, kies alteco estas 1'400 metroj kaj kiu situas sufiĉe poroktime de **La Chaux-de-Fonds**, malkovrigas panoramon, kiu etendiĝas sude de la savojaj Alpoj ĝis la aŭstraj Alpoj, norde vidiĝas la suproj de la montaro Vogezoj.

A.- Tiu ebleco povi malkovri vastan pejzaĝon certe favoras la migradon kaj la intimiĝon kun geografiaj konoj. Oni ŝatas revidi la samajn montojn el diversaj belvidejoj. Kaj iom post iom oni facile situigas la ĉefajn lagojn kaj urbojn de la svisa Mezlando. Ni esperas, ke vi foje

havos la privilegion povi admiri la Monton Blankan aŭ la bernajn Alpoj Eiger, Mönsh kaj Jungfrau el Ĵurasa supro.

Cl.- Ankaŭ la ĵurasaj valoj havas naturscienca intereson. Ilin kovris torfejoj, kiujn la kamparanoj ekspluatadis por vendi la torfon kiel brulaĵon aŭ kiel ĝarden-terplibonigilon. Ankaŭ nun la ĝardena ekspluatado de la torfo estas observebla. Sed pluraj torfejoj estas protektataj. Botanike ilia vizitado estas instrua. Oni povas ekzameni kiel bone difinita grund-acideco influas la vegetaĵaron. Ege limigitaj estas la arboj, plantoj kaj muskoj, kiuj kreskas en torfejo neekspluatata.

A.- Ni finu nian rapidan prezentadon de la ĉirkaŭaĵo de La Chaux-de-Fonds menciante kelkajn altirajn lokojn.

Cl.- Norde de La Chaux-de-Fonds fluadas la rivero **Doubs** en profunda kanjono. El diversaj belvidejoj oni povas admiri ĉu la ricevon mem, ĉu artefaritan lagon. En iu loko la rokaro falis post la antaŭlasta glaci-epoko. Formiĝis natura baraĵo. Oni povas boati sur belega lago kaj iri admiri la akvofalon **Le Sault du Doubs**, kiun la nunaj poŝtmarkoj sesdek-centimaj de Francio reproduktas. Tiu rivero Doubs kaj ties lagoj kaj akvofalo markas la limon inter Svislando kaj Francio.

A.- La monto **Creux-du-Van** estas altira loko. Imagu gigantan duoncirklon, kies rokaro estas alta je tricent metroj kaj vasta je du kilometroj. Tiu cirklo estas rifuĝejo por ĉamoj, sovaĝkaproj aŭ ibekoj kaj marmotoj, kiuj estas protektataj.

Cl.- Proksime de tiu monto troviĝas profunda kaj sovaĝa gorĝo. Ĉefe en printempo kaj dum la pluvaj someroj estas agrable promenadi por admiri la riveron **L'Areuse** fluanta inter vertikalaj kaj mallarĝaj rokaroj.

A.- Vi konstatas, ke dum la liberaj tagoj la partoprenantoj al la kurssesioj de Internacia FERIA Altlernejo scios kion fari.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!